

Михаил Лермонтов,
Ангел

Михаил Лермонтов,
Angêlo

Михаил Лермонтов,
La anĝelo

tradukita de Vasilij Devjatnin

tradukita de Boris Mirski

По небу полуночи ангел летел,
И тихую песню он пел,
И месяц, и звезды, и тучи
толпой
Внимали той песне святой.

En mezo de nokto, en blua
ĉielo,
Traflugis kaj kantis plej bela
anĝelo.
Kaj nuboj kaj steloj kaj lun'
en irado
Atentis kun ĝojo je l' sankta
kantado.

Kun kanto solena en nokta
ĉiel'
Sin portis mirinda anĝel';
Kaj luno, kaj steloj, kaj nuboj
en rond'
Atentis la himnon de l' mond'.

Он пел о блаженстве
безгрешных духов
Под кущами райских садов,
О Боге великом он пел, и
хвала
Его непритворна была.

Li kantis feliĉajn, neniam pe-
kantajn
Spiritojn, kun Di' en ĉielo
loĝantajn;
Li kantis pri Patro ĉiela kaj te-
ra—
Kaj lia laŭdado ne estis mal-
vera.

Li kantis pri vivo sen zorga
ĉagren'
Sub branĉoj de pura Eden';
Kaj laŭd' al keruboj, al granda
Sinjor'
Elflugis sincere el kor'.

Он душу младую в объятиях
нес
Для мира печали и слез;
И звук его песни в душе
молодой
Остался - без слов, но живой.

Animon tre junan en brakoj li
tenis;
En mondo malgaja naskiĝi ĝi
venis.
Kaj sono de l' kanto en juna
animo
Restadis sen vort', sed kun vi-
va estimo.

En brakoj animon li portis al
ter',
Al mond' de malĝojo, mizer';
Kaj restis la kanto en juna
anim'
Sen vorto, sen unu esprim'.

И долго на свете томилась
она,
Желанием чудным полна,
И звуков небес заменить не
могли
Ей скучные песни земли.

Tre longe en mondo ĝi estis
premata,
Je revo mirinda pri Di' pleni-
gata!
Kaj ŝanĝi la kanton de l' sank-
ta sincero
Ne povis por ĝi ĉiuj kantoj de
l' tero.

Kaj plena je stranga, mirinda
dezir'
Ĝi vagis en mond' de sopir',
Kaj tedis al ĝi post la kant' de
l' eter'
La veaj motivoj de l' ter'.

...

...

...

Verkinto de tiu ĉi Rusa poemo estas МИХАИЛ ЛЕРМОНТОВ (*1814-10-15 – †1841-07-27).

Arg-1039-2110 (2014-06-03 12:23:12)

Pri la poeto Lermontov vidu la retejon http://eo.wikipedia.org/wiki/Миджаил_Lermontov.

Traduko de la Rusa poemo “Ангел” de МИХАИЛ ЛЕРМОНТОВ (*1814-10-15 – †1841-07-27) *en Esperanton de* VASILIJ DEVJATNIN (*1862 – †1938).

Arg-1039-2114 (2014-06-03 12:21:00)

Pri la tradukinto vidu la vikipediejon http://eo.wikipedia.org/wiki/Vasilij_Devjatnin.

Traduko de la Rusa poemo “Ангел” de МИХАИЛ ЛЕРМОНТОВ (*1814-10-15 – †1841-07-27) *en Esperanton de* Boris Mirski.

Arg-1039-2113 (2014-06-03 11:55:42)

Tiu ĉi poem-esperantigo troviĝas en <http://donh.best.vwh.net/Esperanto/iteraturo/Poezio/lermontov/angxelo.html>.